

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Kongresis en Sendai, Kongresos en Jokohamo en 2017!

La 102-a Japana Esperanto-Kongreso

okt. 10, 11, 12 en la urbo Sendai.

Inter pli ol 400 aliĝintoj, 18 estis el nia rondo. Ĉi-jara specialaĵo por ni estis la invitosaluto de la 104-a Kongreso (en 2017) al Jokohamo, kiun faris s-ro Nanba Fumiharu, unu el niaj estraranoj, ĉe la Fermo. En la Fermo estis premiitaj jenaj niaj membroj: s-ro Aida Kiyoshi pro traduko esperanten de "Ruĝa Kandeloo kaj Marvirineto" de Ogawa Mimei, kaj s-ro Makino Mitsuo pro filmeto pri elementlernejoj kantantaj en Esperanto. Kiel regule, nia rondo havis standon pri niaj aktivaĵoj kaj eldonaĵoj. S-ro Doi Hirokaz prezidis prelegkunsidon

publikan pri Esperanto kaj Unesko, kie parolis ankaŭ Suzuki Keiichiro, nia membro kaj la prezidanto de Japana Esperanto-Instituto. S-ino Doi Ĉieko prezentis DVD-n pri la tertremo en 1923, kadre de la prelegserio pri la kongresa temo "Esperanto trans la katastrofo". S-ro Makino Mitsuo prezidis du kantokunsidojn de "Rekviemo", kiu estas kanto dediĉita al la viktimoj de la Granda Tertremo en 2011. S-ino Murata Kazuyo prezidis la fakkunsidon pri la projekto Eroŝenko 125. Sibayama Zyun'iti prezidis la Inaŭguron kaj la Fermon.

Ekspozicio ĉe Internacia Festivalo de Jokohamo 2015

okt. 10, 11, en la Parko Zoo-no-hana en la haveno de Jokohamo.

Kvankam multaj membroj forestis pro la

Japana Kongreso, restintaj membroj klopodegis kiel en aliaj jaroj. Kvinminuta kurseto de Esperanto logis vizitantojn.

NIAJ PLANOJ

*La 45-a Zamenhof-Festo de Kanagaŭa
Dec. 6, 13h00-16h30, en la Provluda Ĉambro de la Civitana Teatro, ĉe la Kultur-Centro Soonandai, en urbo Fuĵisaŭa (Huzisawa).

De 13h00 por 90 minutoj, estos prelego malfermita al la publiko (sen kotizo) de nia s-ro Horu Jasuo.

Esperantista parto de 14h45 (kotizo: 800

enoj) inkluzivos prezenton de la rondoj, pri la 100-a UK en Lillo, prezenton de bildoteatro pri Enoŝima, kantojn, vendadon de Esperantaj libroj, ktp.

*La jarfina festeno de nia rondo


Dec. 19, post la kutima lernokunsido, ĉe ĉina restoracio Fukuyoken en la Ĉina Kvartalo.

Prelego

En la 3a de oktobro s-ro Dieter Kleemann prelegis en nia rondo. Jen la resumo.

125-a jubileo de la Esperanto-Movado en Munkeno lige al la 95-a GEA-kongreso

Dieter Kleemann



Munkeno, ĉefurbo de la federacia lando Bavario, nuntempe estas la trie plej granda urbo de Germanujo kun 1,3 milionoj da enloĝantoj. En la publiko ĝi havas la reputacion esti la plej vivoĝoja germana urbo. Oni ĝojas la estadon kaj festas la arton. Fine de la 19-a jarcento ankaŭ Esperanto akiris atenton ĉe pluraj kleraj homoj en Munkeno.

Sed jam ekzistis ekde 1880 alia internacia lingvoprojekto - Volapuko - kreita de la germano Johann Martin Schleyer. Volapuka grupo estis fondita en Munkeno kiu organizis en 1882 la 2-an mondan kongreson de Volapuko. Dum la festa inaŭguro oni eĉ kantis unuafoje komunan himnon!

Tamen post apero de Esperanto la grupanoj finfine decidis transiri al Esperanto-uzado kaj en la jaro 1891 estis fondita la 1-a Esperanto-klubo en Munkeno. Dum la postaj jaroj venis pluraj krizoj sed la grupo ekde 1904 bone evoluis. La unua kulmino de Esperanto-agado en Germanujo estis la 4-a kongreso de UEA en Dresdeno (Saksujo) en aŭgusto 1908. Tiu kongreso forte instigis la aktivecon de la Munkenaj Esperantistoj. Sed baldaŭ aperis nova problemo: la IDO-krizo. En 1909 multaj klubanoj fariĝis idistoj kaj eĉ la loka gazetaro kritike publikigis artikolojn kun jena enhavo: "La tuta ideo pri Lingvo Internacia estas absurda".

Malgraŭ tio la Esperanto-agado en Munkeno multe progresis. Intertempe ekestis

ankaŭ Laborista Esperanto-Grupo. Tamen la 1-a Mondmilito detruis multajn atingitajn sukcesojn. Inter la du mondmilitoj ĉefe kreskis la nombro de la Laborista Esperanto-Grupo. Sed ekde 1933 pro la venko de Hitler en la germana politiko pli kaj pli kreskis publikaj atakoj kontraŭ la Esperantista agado. "Oni prefere ne plu uzu la vorton Esperanto en la publiko". La 15-an de julio 1936 la Germana Esperanto-Asocio devige komplete malfondiĝis.

Post fino de la 2-a mondmilito rapide reaperis la Esperanto-aktivado en Munkeno. La usona milita registaro en decembro 1945 permesis novfondiĝon de Munkena Esperanto-Grupo kiel neŭtrala grupo (la laborista grupo inkluzive). En aprilo 1947 GEA oficiale estis registrita en Munkeno kiel komuna neŭtrala organizo por ĉiuj germanoj. Vera pinto de la Esperanto-agado en Munkeno estis la organizo de la 1-a postmilita Germana Esperanto-Kongreso kun preskaŭ 3000 partoprenantoj! Konsekvence la Bavara Registaro oficiale invitis UEA por kongresi en Munkeno. Okazis en 1951 la 36-a Universala Kongreso de Esperanto kun la 4-a Internacia Somera Universitato.

Partoprenis i.a. tre konataj profesoroj en Esperantujo: D-ro Edmond Privat, D-ro Canuto, Prof. Waringhien. Okaze de tiu kongreso estis inaŭgurita "Esperantoplatz" proksime al la konata ejo de la tradicia "oktobrofesto".

Resume oni povas diri ke Munkenaj Esperantistoj ludis dum ĉ. 30-40 jaroj gvidan rolon en la Esperantista agado en Germanujo. La 125-jara jubileo de la Munkena Esperanto-Grupo certe indas la partoprenon de multaj gesamideanoj!

La 93a Germana Esperanto-Kongreso 2016 okazos en Munkeno, de la 13a ĝis la 16a de majo.

La urbo Sendai: HASEKURA Tunenaga, NRO-UNESKO-movado, Lusin

Tanigawa Hiroshi

(1) HASEKURA Tunenaga

La 102-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en la urbo Sendai.

En la publika kunveno GOTOO Hitosi prelegis kun la titolo "Katastrofo kaj esperanto". Prezentante, ke venis al li post tiu katastrofo de 11a de marto 2011 multaj leteroj, mesaĝoj el esperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj prizorgantaj pri la damaĝoj de la katastrofo. Li emfazis;



"Mi denove, tutkore konstatis, ke Esperanto estas vere lingvo kiu interligas homojn". Li menciis ankaŭ pri la Delegacio al Eŭropo en Keiĉo-epoko (komenco de la 17-a jarcento) kiun sendis DATE Masamune, tiama feŭdestro de Sendai-Provinco. La ĉefo de la Delegacio estis HASEKURA Tunenaga. Kaj rilate tion ni atentis unu mesaĝon adresitan al la Kongreso. La mesaĝo estis de Madrida Esperanto-Liceo, Hispanio. La mesaĝo tekstis; "Antaŭ 400 jaroj diplomata ekspedicio el Sendai vizitis

inter aliaj nian landon. Ne nur vizitis, sed kelkaj ekspedicianoj restis kaj miksiĝis kun la lokanoj; tiel nun en urbeto Coria del Rio ĉirkaŭ mil homoj havas familinomon Japon (Hapon)."



portreto de HASEKURA Tunenaga, nun konservita ĉe La Urba Muzeo de Sendai


(2) NRO-UNESKO

En la inaŭguro SUZUKI keiichiro, Kongresa Prezidanto, menciis; Esperanto kaj UNESKO havas komunan celon kaj idealon, kaj ke UEA kaj UNESKO estadis longe en la operaciaj rilatoj.



Sekve de la inaŭguro ni aŭskultis prelegon de NAKAJIMA Mikiko, ĝenerala sekretario de Sendai UNESKO-Asocio. Ŝi prezentis, ke Sendai estas la naskiĝurbo de la monde unua NRO-UNESKO.

La monde Unua Kongreso de NRO-UNESKO okazis en 1947, en Cucujigaoka en Sendai, kie oni starigis memoran statuon kun la titolo "Knabino en botoj" skulptitan de SATOO Ĉuurjo.



*NRO = Ne-Registara Organizaĵo

(3) Lusin

Publika prelego de FUJII Shozo kun la titolo "Eroŝenko kaj Lusin" treege interesis min.

Lusin estis studento sendita de la ĉina registaro. Li studis medicinon en la Speciala Instituto pri Medicino de Sendai (nuna Medicina Fakultato de la Universitato Toohoku). Lia studtempo estis 3 jaroj. Sed post unu kaj duonjaro da studo li decidis ĉesigi la studon pri medicino, sed fariĝi verkisto. Lusin decideme rezignis studon pri medicino konstatinte, ke kuraci per literaturo la spiriton de ĉinaj popoloj estas multe pli grave kaj valore ol fizike kuraci ilin. Li reiris al Ĉinio kaj partoprenis en la revolucia movado. Lusin trovis Eroŝenkon poeto, kaj invitis lin al Pekina Universitato kiel docenton pri Esperanto kaj

rusa literaturo.



statuo de Lusin starigita en la ĝardeno de la Urba Muzeo de Sendai

Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa, sed en tiu ĉi novembro, sabataj klasoj okazos en la Terĝlaba Placo ĉe Hongoodai)

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Klaso por legado de "Hispana, Kataluna, Mangada..." / (2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: "Vizaĝoj" / (3) Daŭriga kurso

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas "La Zamenhof-Strato" de Roman Dobrzyński. / (2) Daŭriga kurso; legata libro estas "Karlo".

Ĉu furiozis ogroj en rivero?

Doi Ĉieko

La tajfuno n-ro18 japane (nomita Etaŭ <Ataŭ> angle, kiu signifas ŝtorman nubon) atakis nian landon en septembro. Pro tio pluvegis en la distrikto Kantoo (Tokio kaj ĉirkaŭaj gubernioj), de la 9a ĝis la 10a de septembro. Rezulte de tio rompiĝis digo je 140 metrojn longa, de la rivero Kinugaŭa en la urbo Ĵoosoo de la gubernio Ibaraki, 50 kilometrojn nordoriente de Tokio.

Pro la inundo pli ol 6000 domoj estis izolitaj, pli ol 1000 homoj estis forlasitaj en la inundita loko kaj almenaŭ 7 homoj mortis.

Tuj komenciĝis savado per 15 helikopteroj de Defendkorpuso, 6 tiuj de fajrobrigadoj, 7 tiuj de la Agentejo por Surmara Sekuro kaj 8 tiuj de polica sistemo. Laboris ankaŭ aŭtoj kaj boatoj, kaj ankaŭ multaj homoj. Danke al iliaj laboroj minimume 1145 vivoj estis savitaj. Tia efika savado okazis pro tio ke oni faris sistemon de savado inter multaj instancoj post la grandaj tertremoj lastatempaj (en 1995 kaj 2011) kaj trejnadis sin. Tamen restas ankoraŭ taskoj solvendaj: restis lokoj subakviĝintaj sufiĉe longe post la rompiĝo de la digo, kvankam la lokoj estas sufiĉe for de la rompiĝinta digo. Nun, pli ol unu monaton post la inundo, pli ol 400 homoj loĝas en rifuĝejoj.

Pri la kialo de la inundo nun oni pristudas kaj diskutas diverse. Multaj opinias, ke ĉi-foje unue alfluis rivera akvo super la digo kaj poste okazis ĝia rompiĝo. Rilate al la rivero Kinugaŭa, ĝis nun multfoje okazis inundoj: en la jaroj 1723, 1885, 1889, 1890, 1896, 1902,

1910, 1914, 1935, 1938, 1947, 1949, 1982 kaj 2002. Ja tiel ofte! Kial oni ne faris pli fortan digon kontraŭ inundo spite de multaj spertoj? La nomo de la rivero estas Kinu-gaŭa, kiu signifas riveron de furiozaj ogroj. Ĉu vere furiozis ogroj?

La japana insularo estas kruta, kaj riveroj en Japanio fluas de altaj montoj, kvazaŭ torente al la malsupro, al la maro. Pro tio pluva fluado alportas subitan altiĝon de rivera altnivelo. Dume digoj ĉe riveroj malaltiĝas jaron post jaro, ĉar homoj prizorgas arbojn ne tiel atente kiel antaŭe, kaj pluvego amase alfluigas sovaĝan teron en la riveron; la tero amasiĝas sur riverfundo. Dume la alteco de la digo estas same kiel antaŭe. Do malprofundiĝas riveroj. Kvankam oni faras kontraŭsablajn digojn, ili fariĝas plenaj de sabloj en kelkaj jaroj. Tial la kontraŭrimedo ne estas efika. Ofte okazas disfalo de montoj ĉe la rivero Kinugaŭa.

Oni diskutas ankaŭ pri alia kaŭzo. Tio estas, ke la katastrofo okazis pro sunenergiaj paneloj. Pro esplorado klariĝis ke en plejparto de inundaj lokoj akva nivelo estis kelkdek centimetrojn profunda, sed tiu ĉirkaŭ sunenergiaj paneloj estis pli ol 150 centimetrojn profunda. Antaŭe estis unu kilometro da loko kie ne estis artefarita digo ĉe la rivero, sed estis natura digo. Iu kompanio, kiu okupiĝas pri konstruado de sunenergiaj paneloj, forigis parton de la natura digo. Tio kaŭzis ĉi-fojan inundon. Ja mankis rimedoj kontraŭ rompiĝo de digo en Japanio!